

10210

Esperanto aktuell

2011/6



1/93

ESPERANTO

ESPERANTO
aktuell



1/92

ESPERA

K10210

Esperanto

aktuell 2006/1



Esperanto
aktuell

1/82

1. Jahrgang
Januar/Februar 1982



eranto
uell 2011/1



30 Jahre „Esperanto aktuell“

Antaŭ la jubilea jaro

Du novaj komisiitoj de GEA

„Avo Paŭlo“ – infanlibro de la jaro

(ES) en Burg/Spreewald

Redakteur

or la nova estraro

io en Nördlingen

Deutscher Esperanto-Bund e.V. (D.E.B.)

Germana Esperanto-Asocio r.a. (GEA)

Amtsgericht Berlin VR 13651 B
www.esperanto.de/deb

Adreso kaj Oficejo / Anschrift und Geschäftsstelle

Henryk Wenzel, 030/692048-460, faks. -469,
Einbecker Straße 36, 10317 Berlin
infozentrum@esperanto.de

Ĝenerala sekretario / Generalsekretär

Martin Schäffer, deb@esperanto.de

Membroprizorgado / Mitgliederbetreuung (KiDiS):

gea.ma@esperanto.de

Bankokonto (por membrokotizoj kaj donacoj) / **Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge und Spenden): Sozialbank Mainz, BLZ 550 205 00, Konto 8603600. Spenden und Mitgliedsbeiträge für den D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

Estraro / Vorstand

Netzpost an / retmesaĝo al
gea.fe@esperanto.de

Die einzelnen Netzpostadressen haben die Form Vorname.Name@esperanto.de, soweit nicht anders angegeben.

Prezidanto / Vorsitzender

D-ro / Dr. Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, 48356 Nordwalde, tel. 02573/626

Vicprezidanto / Stellvertretender Vorsitzender

Andreas Emmerich, Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal, 06063/913714

Trezoristo / Finanzverwalter

Andreas Diemel, Bismarckstraße 168, 47057 Duisburg, gea.tr@esperanto.de, 0203/2964877, Büro: 0211/4566913, Mobil: 0175/8764601, Fax: 03212/2631982

Varbado / Infomaterial

Sebastian Kirf, Dodo-Wildvang-Str. 4, 26723 Emden, 07000/5473638, retposhto@kirf.de

Instruado / Lehrerarbeit

Christof Krick, Günninghauser Str. 11a, 59955 Winterberg, 02981/899557

Eksteraj rilatoj, gazetara parolisto / Außenbeziehungen, Pressesprecher

D-ro/Dr. Rainer Kurz, Plettenbergstr. 19, 70186 Stuttgart, 0163/3873785

Landaj ligoj / Landesverbände

Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 1, 53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler, 02641/4885

Eŭropa laboro, kursoj / Europaarbeit, Kurse

Felix Zesch, Bornemannstr. 11, 13357 Berlin, tel. 0371/50349336

Junulara agado / Jugendvertreter

Julia Hell, Zschopauer Straße 144, 09126 Chemnitz, 0371/50349336

Komisiitoj / Beauftragte

Gazetara laboro / Pressearbeit

Thomas Sandner, Georg-Boehringer-Weg 17, 73033 Göppingen, 07161/9869392, 0172/2658027, Thomas.Sandner@esperanto.de

Libroservo / Bücherdienst

D-ro / Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, (vespere/abends) 06136/46232, Wolfgang.Schwanzer@esperanto.de, www.esperanto-buchversand.de

Printempa Semajno Internacia (PSI) / Internationale Frühlingswoche

D-ro / Dr. Jörg Gersonde, Hermann-Wäschke-Str. 31, 06366 Köthen, 03496/558517, fakso / Fax 030/692048469, psi@esperanto.de, www.esperanto.de/psi

Rondvojaĝoj / Rundreisen

Lars Sözüer, Realschulstr. 12, 47051 Duisburg, lars.duisburg@gmx.de

Eŭropa Komisiono / Europa-Beauftragter

Winfried von Wallis, Johann-Sebastian-Bach-Str. 94, 40789 Monheim, 02173/31616 w.von.wallis@ish.de

Kontaktadresoj / Kontaktadressen

Julia Noe, Handschuhsheimer Landstr. 91, 69121 Heidelberg, tel. 06221-3270724, Julia.Noe@esperanto.de

Pliaj adresoj / Weitere Adressen

Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /

Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, bero@esperanto.de, www.esperanto.de/gej

Interkultura Centro Herzberg (ICH) / Bildungszentrum des D.E.B.

Komisiitoj/Beauftragte: Zsófia Kóródy (instruado), Peter Zilvar (klerigado kaj kulturo), Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax -/1363, esperanto-zentrum@web.de, http://esperanto-urbo.de

Germana Esperanto-Instituto /

Deutsches Esperanto-Institut

Prof. D-ro/Dr. Martin Haase, Lehrstuhl für Romanische Sprachwissenschaft, 96045 Bamberg, 0700/54648478, Martin.Haase@uni-bamberg.de, www.martinhaase.de

Germana Esperanto-Biblioteko /

Deutsche Esperanto-Bibliothek

p/a. Karl Heinz Schaeffer, Schulstr. 17, 73432 Aalen, kh.schaeffer@t-online.de

Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung

Herbert Mayer, Postfach 308, 1015 Wien, herbert.mayer@onb.ac.at

Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal, 030/692048-460, stiftungmondo@gmail.com, Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG, BLZ 600 901 00. Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

Aŭstria Esperanto-Federacio / Österreichischer Esperanto-Verband

Postfach 39, 1014 Wien
aef@esperanto.at, www.esperanto.at

Aŭstria Esperanto-Junularo /

Österreichische Esperanto-Jugend

Weissgerberlande 30-36/5/11, 1030 Wien, aef@esperanto.at, http://aef.esperanto.at

Esperanto-Muzeo Vieno / Esperanto-Museum Wien

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien, +43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 308, 1015 Wien, plansprachen@onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm

UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundesbeauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA

Germanio / Deutschland

D-ro / Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, (vespere / abends) +49/6136/46232, Wolfgang.Schwanzer@esperanto.de

Aŭstrio / Österreich

Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg, tel., fakso +43/2243/22052, aon.913548977@aon.at

Esperanto aktuel

ISSN 0942-024 X

30. Jahrgang

Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V., der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

Redaktisto / Redakteur

Stano Marček, Zvolenská 15/21, SK-03601 Martin, Slovakio.

Presejo / Druck

Alfaprint s.r.o. Martin, Slovakio

Esperanto aktuel havas ses numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la komisiono por membroprizorgado (vidu supre) por 18 € (24 € eksterlanden) jare.

Esperanto aktuel erscheint sechs Mal pro Jahr.

Der Bezug ist im Mitgliedsbeitrag enthalten.

Anoncoj: Petu aktualan prezliston ĉe: deb@esperanto.de.

Anzeigen: Eine aktuelle Preisliste geht auf Anforderung (möglichst per Netzpost) zu.

Kontribuoj / Beiträge

Bv. sendi viajn kontribuojn por *Esperanto aktuel* 2012/1 ĝis la 15-a de januaro 2012 al la redaktisto Stano Marček, laŭeble elektronike al ea@esperanto.de. Bitte senden Sie Ihre Beiträge für *Esperanto aktuel* 2012/1 bis zum 15. Januar 2012 an den Redakteur Stano Marček, möglichst elektronisch an ea@esperanto.de.

Liebe Leser!

Doppeltes Jubiläum für *Esperanto aktuell*: Seit 30 Jahren erscheint es jetzt, davon 1 Jahr in neuer Aufmachung. Und es wird aufmerksam gelesen: Hingewiesen wurden wir darauf, dass die Kontaktadresse für den Berliner Kongress 2012 weggelassen worden war, Havanna nicht in Vietnam liegt und Mexiko auf Esperanto „Meksiko“ heißt (nicht: „Meksikio“). Ansonsten kam auch viel Lob und Ermutigung. Wir lassen *Esperanto aktuell* deshalb auch 2012 in der jetzigen Form.

2011 ist fast vorüber, mit 2012 kommt ein Jubiläumsjahr. Wie andere Landesverbände auch plant der Deutsche Esperanto-Bund (D.E.B.) in Zusammenarbeit mit dem Esperanto-Weltbund Aktionen im ganzen Land. Bitte machen Sie mit! Unsere Fachleute bereiten dazu einen ganz neuen Netzauftritt des D.E.B. vor. Dank der höheren Beiträge hat sich unsere finanzielle Situation stabilisiert und erlaubt höhere Ausgaben für Werbung.

Dafür danke ich allen unseren Mitgliedern und Aktiven und wünsche Ihnen ein gutes Jahr 2012, das hoffentlich auch für unsere Sprachgemeinschaft erfolgreich ist.

Karaj legantoj!



Duobla jubileo por *Esperanto aktuell*: Ekde 30 jaroj ĝi entute aperas, 1 jaron en la nuna formo. Ke ĝi estas legata, provas reagoj pri eraroj: En la lasta numero forfalas sub la aligilo por la Berlina kongreso 2012 la kontakt-adreso; ni invitis al la Universala Kongreso en Havano, Vjetnamujo, kaj la ĝusta landnomo estas „Meksiko“ (ne „Meksikio“). Cetere atingis nin multaj laŭdaj kaj kuraĝigaj vortoj. Ni do lasos *Esperanto aktuell* en la nuna formo ankaŭ en 2012.

2011 preskaŭ pasis, 2012 venos, ĝi estos jubilea jaro. Same kiel aliaj landaj asocioj Germana Esperanto-Asocio (GEA) planas kunlabore kun Universala Esperanto-Asocio tutlandan aktivadon, bonvolu subteni tion kaj kunagu. Niaj specialistoj i.a. planas tute novan GEA-paĝaron en la Interreto. Danke al la pli altaj kotizoj nun ankaŭ niaj financoj stabiligis kaj ebligas investon por varbado.

Mi pro tio kore dankas al ĉiuj niaj membroj kaj aktivuloj, dezirante al vi bonan jaron 2012, esperinde prosperan ankaŭ por nia lingvokomunumo.

Rudolf Fischer

Enhavtabelo/Inhalt

- 1 30 jarojn aĝas *Esperanto aktuell*.
- 2 Adresoj / Adressen
- 3 Germana Esperanto-Asocio: Karaj legantoj. Atentu vian konton. Enhavtabelo
- 4 Novaj komisiitoj: prezento de Horst Vogt kaj Hermann Kroppenberg
- 5 El la estraro: Verbandsratssitzung in Herzberg am letzten Oktoberwochenende. Geld von der Europäischen Union für unsere Mitglieder
- 6 El la vivo de la Esperanto-grupo Darmstadt
- 7 La 1a Esperantista Migrado Aŭtuna kun videofilmo en la reto. 125 Jahre Esperanto – mehr als eine Sprache
- 8 Mitgliedsbeiträge und Spenden 2011. Donackvitancoj. Kie restas via kotizo?
- 9 Internacia Kultura Centro Herzberg: Urboj disaj kaj kunaj. SANO-2
- 10 Fakgrupo de la katolikoj: Tri Esperantaj jubileoj en la diocezo Speyer. Bibliaj Tagoj en Trento
- 11 El la historio de Germana Esperanto-Asocio: 100 jaroj de Esperanto en Pasing
- 12 30 jarojn *Esperanto aktuell*
- 14 Rejnland-Vestfalia Esperanto-Ligo: 19a intensa semajnfino de REVELO en Sundern
- 15 Esperanto en la amaskomunikiloj. Germana Esperanto-Asocio ricevis danke jenajn revuojn
- 16 Fakgrupo de la fervojistoj: Eisenbahner-Weltkongress 2012 in der Esperanto-Stadt Herzberg am Harz
- 17 El Aŭstria Esperanto-Federacio: „Mondvojaĝantoj“ – Esperanto-Aussteiger vor 100 Jahren
- 19 Naturparko kaj Esperanto: Arbeitsgruppe / Laborgrupo „Nacia parko Harz“ kun unuaj rezultoj
- 20 El la mondo
- 22 Recenzo: Esperanto konnte auch entwaffnend wirken. Ein Buch über Hoffnungen und Sehnsüchte in der DDR
- 23 Savoprojekto por minacataj lingvoj
- 24: Bibliotekoj: Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen, Folge 2: Die Fernleihe
- 25: Literaturo: Erlanger Kinderbuch Opa Pablo / Avo Paulo „Infanlibro de la Jaro“. Aufkleber auch in Esperanto. Memtrompo per la Angla
- 26 30 jaroj de la subtena asocio Bona Espero
- 27 **kune** – revueto de Germana Esperanto-Junularo: Hallo und herzlich willkommen, liebe Leser. GEJ invitas al la jarĉefkunveno. Aktivula Renkontiĝo fermiĝis en kebabejo. Francio
- 31 Anmeldeformular für den Gemeinsamen Esperanto-Kongress 2012 in Berlin-Lichtenberg
- 32 Kalendaro. Humurbildo

Wenn Sie Ihren Mitgliedsbeitrag einziehen lassen, ...

... kontrollieren Sie bitte, ob sich Ihre Bankverbindung (evtl. nur die Bankleitzahl) seit Januar 2011 geändert hat. Dann bitten wir umgehend um Mitteilung Ihrer neuen Kontoangaben, evtl. über unser elektronisches Änderungsformular www.esperanto.de/deb/aendern.html.

Ein vergeblicher Einzug wird uns nämlich mit 4,50 € in Rechnung gestellt.

Wenn Sie Ihren Mitgliedsbeitrag nicht einziehen lassen, ...

... bitten wir um möglichst baldige Überweisung des Mitgliedsbeitrags. Eine Übersicht der Mitgliedskategorien und -beiträge finden Sie im Netz unter www.esperanto.de/deb/mitglied.html

Alternativ können Sie uns auch formlos eine Einzugsermächtigung erteilen, per Netzpost an gea.ma@esperanto.de oder auch mit dem o. g. Änderungsformular.

Mit freundlichen Grüßen, Henryk Wenzel, Martin Schäffer
(Mitgliederbetreuung)

Beauftragter für Registrierung von Medienecho

Ich bin Hermann Kroppenberg und wurde 1947 in Bensberg (heute zusammengelegt mit Bergisch Gladbach) geboren.

Nach einer kaufmännischen Ausbildung erlernte ich in den sechziger Jahren den Beruf des

Konditors. Gerne würde ich im Betrieb ausländischen esperantosprechenden Konditoren (bevorzugt ohne Deutschkenntnisse) ein Praktikum ermöglichen, bisher hat sich leider noch kein Interessent gemeldet.

Zu Esperanto, das mir zwar schon seit der Kindheit ein Begriff ist, bin ich vor einigen Jahren auf dem



Umweg über die Stenografie gestoßen. Nachdem ich anfangs nur sporadisch lernte, habe ich mich seit etwa vier Jahren mit Nachdruck der Internationalen Sprache gewidmet, und sie schenkt mir seitdem viel Freude. Im Umfeld meiner beruflichen Tätigkeit versuche ich, die praktische Anwendung von Esperanto zu fördern, indem ich beispielsweise Produktnamen auf Esperanto ersinne, Aushänge zweisprachig anbringe oder Handzettel auch in Esperanto auslege. Für alles finden sich viele Möglichkeiten.

Der Bitte, alles Echo zu Esperanto in den Massenmedien zu sammeln und für

Esperanto aktuell zusammenzustellen, komme ich gerne nach und würde mich freuen, wenn viele Esperantofreunde Nutzen daraus zögen. Ich bin für jeden Hinweis auf die Erwähnung von Esperanto in den Medien dankbar. Schreiben Sie an meine Netzpostadresse hermann.kroppenberg@esperanto.de. Ich danke Ihnen.

Beauftragter für Leserecho und für die Kampagne „125 Jahre Esperanto“

Ich heiße Horst Vogt und wurde 1942 in Kassel geboren. Nach dem Abitur studierte ich in Hamburg und Marburg Jura und trat nach der in Fulda und Kassel verbrachten Referendarzeit und dem Abschluss-Examen in die Rechtsabteilung einer großen Bausparkasse ein.

Ich wohne mit meiner Frau in Schwäbisch Hall und genieße inzwischen den Ruhestand. Wir haben zwei erwachsene Söhne und einen Enkel, der gerade anfängt, bei mir Esperanto zu lernen.

Über Esperanto habe ich das erste Mal Positives von meinem Vater gehört, der aber der Meinung war, „dass es das mal vor dem Kriege gab“. Als Studienanfänger



erfuhr ich dann aber zu meinem Erstaunen, dass es an der Universität Hamburg einen Lehrbeauftragten für Esperanto (Werner Bormann) und einen studentischen Esperanto-Klub gab, dem ich mich anschloss. Die internationale Sprache hält mich seither in ihrem Bann.

Ich schreibe gelegentlich Kurzgeschichten und fertige Übersetzungen für Esperantozeitschriften an. Einige Jahre war ich als Kassier in der FAME-Stiftung tätig. 2008 beendete ich erfolgreich die Interlinguistischen Studien bei Ilona Koutny an der Universität Posen.

Als Beauftragter für Leserecho werde ich in Leserbriefen zu positiven oder kritischen Veröffentlichungen zu Esperanto bzw. der Sprachenfrage in geeigneter Weise Stellung nehmen. Dabei werde ich eng mit Hermann Kroppenberg zusammenarbeiten.

Für das kommende Esperanto-Jubiläumsjahr obliegt mir als Landesbeauftragter die Zusammenarbeit mit dem dafür Zuständigen beim Welt-Esperantobund, Brian Barker. Ich werde Artikel zum Jubiläum für die Presse verfassen und mit Thomas Sandner abstimmen, der die erforderlichen Kontakte unterhält. Für beide Aufgaben kann ich Hinweise und Anregungen an meine Netzpost-Adresse horst.vogt@esperanto.de von den *Esperanto aktuell*-Lesern gut gebrauchen.

Verbandsratssitzung in Herzberg am letzten Oktoberwochenende

Vom 28. bis 30. Oktober trafen sich 12 Aktive des Deutschen Esperanto-Bundes (D.E.B.), Vorstandsmitglieder und Beauftragte einiger Landesverbände, in Herzberg zum alljährlichen Verbandsratswochenende. Die Veranstaltung in der Stadtbücherei von Herzberg begann am Freitagabend mit einer Diskussion zum neuen Erscheinungsbild der Verbandszeitschrift *Esperanto aktuell*. Rudolf Fischer machte deutlich, dass ein zweiter Redakteur gefunden werden sollte, der die deutschsprachigen Artikel sammelt.

Am Samstag ging es weiter mit einer Zwischenbilanz zum Mitgliederverwaltungsprogramm iDiS. Bedauerlich ist, dass die Landesverbände und Ortsgruppen es zu selten benutzen. Über die Gründe dafür wurde diskutiert. Anschließend wurde den Anwesenden das Grundtvig-Projekt vorgestellt. Diese legten die Bedingungen für die Teilnahme von D.E.B.-Mitgliedern fest. Über die Vorbereitungen zum gemeinsamen dänisch-polnisch-deutschen Kongress in Berlin-Lichtenberg berichtete Henryk Wenzel. Man rechnet mit 250 bis 300 Teilnehmern. Wegen günstig gelegener Pensionen oder Hotels wende man sich an Herrn Wenzel (kek2012@esperanto.de). Felix Zesch berichtete, dass er einen Kommentar zu den

Sonnenberger Leitsätzen des D.E.B. erarbeitet. Dieser soll im Internet und auch in der Schriftenreihe des Deutschen Esperanto-Instituts veröffentlicht werden. Für das Jubiläumsjahr einigten sich die Teilnehmer auf das Motto „125 Jahre Esperanto - mehr als eine Sprache“. Die Veranstaltung schloss am Sonntag mit einer teils öffentlichen Vorstandssitzung.

Auch im nächsten Jahr will sich der Verbandsrat Ende Oktober wieder in Herzberg treffen. Es wäre schön, wenn sich dann Beauftragte aus allen Landesverbänden dort versammeln würden. Teilnahmekosten können von den aktiven Landesverbänden aus den D.E.B.-Zuwendungen erstattet werden.

Wolfgang Bohr

Geld von der Europäischen Union für unsere Mitglieder

Im Rahmen des Programms „Grundtvig - Lebenslanges Lernen“ der Europäischen Union (EU) hat der Deutsche Esperanto-Bund (D.E.B.) zusammen mit einigen benachbarten Esperanto-Verbänden einen Projektantrag zum Themenbereich „Interkulturelle Kommunikation“ bei der EU gestellt. Bislang wurden die Länder Schweiz, Frankreich, Katalonien und Deutschland von ihren jeweiligen Nationalen Agenturen akzeptiert. Federführend ist die Schweiz (Svisa Esperanto-Societo).

Die erste Rate von mehreren tausend Euro ist inzwischen bereits auf dem Konto des D.E.B. eingegangen. Der D.E.B.-Vorstand hat auf seiner letzten Sitzung in Herzberg festgelegt, dass ordentliche D.E.B./DEJ-Mitglieder, die an bestimmten Projekttreffen zum Thema „Interkultureller Dialog“ in Frankreich, Katalonien oder der Schweiz teilnehmen, unter folgenden Bedingungen einen Reisekostenzuschuss erhalten:

- Man muss sich rechtzeitig vor Reiseantritt beim D.E.B. für ein (oder mehrere) Projekttreffen melden und zugelassen werden.
- Nachweis der Fahrt durch Originalbelege: Flugkarten (sowie Bordkarten!), Fahrkarten oder Tankquittungen aus dem besuchten Land
- Nachweis der Unterkunft im Original (Hotelquittung o. ä., Originalbeleg)
- Teilnahmebestätigung (Vordruck gibt es nach der Anmeldung vom Unterzeichner)

- ein Kurzprotokoll der besuchten Veranstaltung auf Esperanto und Deutsch (möglichst mit Fotos, insgesamt ca. 2 Seiten)

Der Vorstand hat die Absicht, grundsätzlich die Fahrtkosten (Flugkosten, Bahnfahrten und Fahrten mit dem Pkw), den Aufenthalt und die Teilnahmegebühr von maximal 15 deutschen Fahrtteilnehmern zurückzuzahlen. Im Durchschnitt ist ein Betrag von 500 Euro kalkuliert.

Erst nach vollständiger Zusendung der o. g. Unterlagen an den Unterzeichner erfolgt die Auszahlung des Zuschusses an den Reiseteilnehmer. Die Reisekosten müssen also zunächst vom Reisenden vorgestreckt werden.

Geplant sind schon folgende ausländische Projekttreffen: Oktober 2012 in der Schweiz (SFERO) und Februar 2013 in Frankreich. Genauer muss noch festgelegt werden.

Ansprechpartner des D.E.B.-Vorstandes: Wolfgang Bohr, wolfgang.bohr@esperanto.de

El la vivo de la Esperanto-grupo Darmstadt – lastaj eventoj

Informstando de la Esperanto-grupo dum interkultura festo en la centro de Darmstadt

La 21an de majo okazis la jam tradicia interkultura renkontiĝfesto sur Luisenplatz, centra placo de Darmstadt. Estis standoj de diversnaciaj enloĝantoj de Darmstadt kaj ĝia ĉirkaŭo (i.a. partoprenis somalianoj, palestinanoj, turkoj, francoj, eritreanoj, bulgarioj...), kiuj vendis tipajn manĝaĵojn, trinkaĵojn kaj kantis aŭ dancis sur scenejo. Nia bone videbla stando alloge prezentis lernolibrojn, vortarojn, prospektojn, esperantlingvan literaturon kaj ni kolektis adresojn de tiuj, kiuj sin interesis pri gustumkurso (Schnupperkurs). Ĉeestis ankaŭ nia novelektita verdpastia ĉefurbestro. Al li ni donacis esperantan glumarkon („Atomenergio? Ne dankon!“).

Ĝemelurba renkontiĝo de Darmstadt, Alkmaar, Troyes kaj Brescia

De la 2a ĝis la 5a de junio okazis ĝemelurba Esperanto-renkontiĝo en Darmstadt, dum kiu partoprenis esperantistoj el la nederlanda urbo Alkmaar, el la franca urbo Troyes kaj unuafoje ankaŭ el la itala urbo Brescia. Entute venis 29 alilandaj gastoj, inter ili ankaŭ bulgaro loĝanta en Nederlando, ukraina

paro vivanta apud Brescia kaj hungaro el Tata, la hungara ĝemelurbo de Alkmaar. La plimulton de tiu vere internacia gastaro loĝigis la Esperantistoj en siaj hejmoj. Ili jam de monatoj estis intense laborintaj por prepari interesan, instruan kaj amuzan programon al la gastoj. Oni komune vizitis farbojn kaj lakojn produktantan fabrikon kaj ankaŭ asparagoplantejon, post kiam ĉiuj estis ĝuintaj bongustan asparagan tagmanĝon. La plimulto de la komunaj manĝoj okazis en la liberpensula centro de Darmstadt, kiu gastame akceptas la Esperanto-grupon ankaŭ dum ĝiaj monataj kunvenoj. Ĉar dum tiu longa (Ĉielirtaga) semajnfino ankaŭ okazis la oficiala Europawochenende organizita de la urbo Darmstadt, kiu festis la 20an datrevenon de la ĝemeliĝo kun Brescia, la Esperanto-grupo kun siaj eŭropaj gastoj havis okazon partopreni en programeroj de la oficiala urba programo. Tiel ili kune ĝuis klasikan koncerton de muzikistoj el la svisa ĝemelurbo Saanen en festsalono Orangerie. Sub belega ĉielo ili kunmarŝis en Grenzgang (promenado de centoj da Darmstadt-anoj kaj loĝantoj de la ĝemelurboj laŭlonge de la urbaj limoj plejmulte tra arbaro). Diversloke manĝaĵ- kaj trinkaĵstandoj de multaj el la 15 ĝemelurboj de Darmstadt disdonis tipajn manĝaĵetojn, vinon, bieron aŭ brandon al la internacia marŝantaro. Kompreneble la esperantistoj uzis la duhoran promenadon por diskonigi la internacian lingvon kaj Malvo, tre bona ĥoruso de la Esperanto-grupo Alkmaar, eĉ kantis apud la oficiala stando de la urbo Alkmaar kelkajn Esperanto-kantojn.

Maria Merla



Antaŭ pasko Maria Merla renkontis membrojn de la loka Esperanto-grupo en la ĝemel-urbo Graz



Foto: Hedwig Fischer

1a Esperantista Migrado Aŭtuna kun videofilmo en la reto

La 1a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA) arigis 22 partoprenantojn el Svislando, Francujo kaj Germanujo, inter la 2a ĝis la 7a de oktobro 2011 ĉe Rejno.

Gaja etoso regis inter la pliaĝuloj, kiuj estis la ĉefa celgrupo de tiu nova aranĝo de Germana Esperanto-Asocio (GEA). Post sufiĉe streĉa marŝado kaj grimpadado, vespere dorlotis la komforta hotelo, kaj ekde la dua tago la kelnero jam fervore lernis Esperanton. La grupo i.a.

vizitis la Kaiserpfalz, fama dogana burgeto sur Rejn-insulo antaŭ Kaub, kie haveblis dupaĝa gvidilo ankaŭ en Esperanto. Sur la fama roko Loreley (sur la bildo) la grupo prezentis la internaci-lingvan version de la samtitola poemo de Heinrich Heine. Oni povas vidi videofilmon sub <http://www.youtube.com/watch?v=JdH07MzPJ3A>.

La ĉef-organizanto Wolfgang Bohr anoncis la 2an EMAn por la venonta jaro, la loko ankoraŭ ne estas elektita. Maksimuma nombro de partoprenantoj estu 30 por konservi la amikaran etoson.

(voko)

Motto und Aktionen in Herzberg verabschiedet 125 Jahre Esperanto – mehr als eine Sprache

Lange wurde auf der frei zugänglichen Netzseite <http://tricider.com/de/t/decide/?show=1xdV> nach einem zugkräftigen Motto für das Jubiläumsjahr 2012 gesucht. Gewisse Zustimmung fanden:

- 125 Jahre Esperanto – eine Sprache ist entstanden (3 Stimmen)
- 125 Jahre Esperanto – die Sprache lebt (8 Stimmen)
- 125 Jahre Esperanto – Verständigung auf Augenhöhe (2 Stimmen)
- 125 Jahre Esperanto – eine andere Verständigung ist möglich (2 Stimmen)
- 125 Jahre Esperanto – sich verstehen ist so einfach (9 Stimmen)
- Leicht und lebendig – Esperanto wird 125 (2 Stimmen)

Für den Deutschen Esperanto-Bund (D.E.B.) sollte auf der Beiratssitzung vom 29. Oktober in Herzberg ein Motto

verabschiedet werden. Zu den oben aufgeführten Vorschlägen kam noch spontan hinzu: 125 Jahre Esperanto – mehr als eine Sprache.

Dieses Schlagwort stammt aus der Zeitschrift La Ondo, in der Trevor Steele einen bemerkenswerten Artikel über die heutige Esperanto-Bewegung schrieb. Dabei erwähnte er zwei Mal, dass „Esperanto mehr als eine Sprache“ ist. Die Anwesenden fanden diesen Spruch auf Anhieb überzeugend und wählten ihn einstimmig.

Der D.E.B. schließt sich ferner den grenzüberschreitenden Aktionen des Esperanto-Weltbundes (UEA) und des Esperantolehrer-Weltverbandes (ILEI) an. Das ist zum einen eine verstärkte Pressearbeit, für die der D.E.B. zwei neue Beauftragte begrüßen darf (siehe S. 4), zum anderen ein bundesweit anzubietender Esperanto-Kurs, der breite Beteiligung erzielen soll. http://uea.org/vikio/Projekto_125

(ruf)

Mitgliedsbeiträge und Spenden 2011

Mitgliedsbeiträge und Spenden können Sie bei Ihrer Einkommensteuererklärung als Sonderausgabe geltend machen. Soweit die Zahlung 200 € nicht übersteigt, müssen Sie keine Zuwendungsbescheinigung des Deutschen Esperanto-Bundes (D.E.B.) einreichen, sondern es geht auch so:

Der beste Nachweis ist der Originalkontoauszug. Alternativ wird in der Regel anerkannt:

- ein Ausdruck des Kontoauszugs beim Homebanking.
- der Bareinzahlungsbeleg mit dem Vermerk der Bank „Zahlung erfolgt“,
- der von der Bank quittierte Überweisungsbeleg

In den letzten beiden Fällen müssen auf dem Bankbeleg erscheinen:

- Name und Kontonummer des Auftraggebers
- Name und Kontonummer des Empfängers
- Betrag und Buchungstag
- in der Betreffzeile der Vermerk „Spende“ oder „Mitgliedsbeitrag“

Zusätzlich müssen Sie die unten stehende Bescheinigung über die Gemeinnützigkeit des D.E.B. dem Beleg beifügen.

Wenn Sie schon für 2010 eine Bestätigung über Ihren Beitrag entweder unaufgefordert erhalten haben oder um regelmäßige Zusendung gebeten haben, ist dieser Wunsch im Verwaltungssystem iDiS registriert und wird auch für 2011 berücksichtigt werden. Bei höheren Beträgen als 200 Euro kommt eine Zuwendungsbestätigung ebenfalls automatisch. Die Zuwendungsbestätigungen werden bis spätestens Ende März 2012 verschickt. Sollten Sie bis dahin eine erwartete Zuwendungsbestätigung nicht erhalten haben, wenden Sie sich bitte an unseren Schatzmeister Andreas Diemel (gea.tr@esperanto.de).

Die Bescheinigung über die Gemeinnützigkeit können Sie sich aber auch jederzeit von folgender Seite im Netz herunterladen:
<http://www.esperanto.de/deb/quittungen.html>

Ein Tipp: Wer seinen Jahresbeitrag 2012 schon im Dezember 2011 überweist oder einziehen lässt, kann den Betrag 1 Jahr früher absetzen.

Wie viel haben Sie 2010 mit Ihrem Vollbeitrag von 46 € wofür bezahlt?

Die Mitgliedsbeiträge deckten knapp 70% der Ausgaben. 30% der Ausgaben wurden aus Spenden und nicht mit Ihrem Beitrag bezahlt.

Gehälter	11,73 €	25,5%
Berliner Büro	3,03 €	6,6%
Reisekosten	1,92 €	4,2%
Büromaterial	0,38 €	0,9%
Telefon	0,09 €	0,2%
Bankgebühren	0,11 €	0,2%
Zwischensumme	17,26 €	 37,6%

Subventionen für Landesverbände

und Ortsgruppen.....	6,47 €	14,1%
Beiträge UEA, EEU	1,03 €	2,2%
Unterricht (Herzberg).....	7,16 €	 15,6%
<i>Esperanto aktuell</i>	11,88 €	25,8%
Deutscher Esperanto-Kongress	0,00 €	0,0 €
Printempa Semajno Internacia	0,43 €	0,9%
Deutsche Esperanto-Bibliothek	1,77 €	3,8%
Deutsches Esperanto-Institut	0,00 €	0,0%
Marie-Hankel-Zentrum Dresden.....	0,00 €	0,0%
Summe	46,00 €	... 100,0%

✂----- kopieren oder ausschneiden -----✂

Bescheinigung über Gemeinnützigkeit

Der Deutsche Esperanto-Bund e.V. ist nach dem letzten uns zugestellten Freistellungsbescheid des Finanzamts für Körperschaften I Berlin vom 29.08.2011 (Steuernummer 27/663/59791) gemäß § 5 Abs. 1 Nr. 9 KStG von der Körperschaftssteuer befreit. Es wird bestätigt, dass die Zuwendung nur zur Förderung des Völkerverständigungsgedankens (im Sinne der Anlage 1 - zu § 48 Abs. 2 EStDV - im Abschnitt A Nr. 10) verwendet wird (Verwendung kann auch im Ausland sein).

Andreas Diemel, Schatzmeister <gea.tr@esperanto.de>

Urboj disaj kaj kunaj

Kion komunan havas Bialistoko, Budapeŝto, Greziljono, Hago, Herzberg, Svitavy, Sarajevo, Seulo kaj Vieno, krom ke ili situas en malsamaj landoj? Nu, ili havas Kulturen Esperanto-Centron. Kaj ili aperis en la programo de Torpedo 7, la jara renkontiĝo de AGEI, la germana sekcio de ILEI. Trideko da partoprenantoj veturis el ok landoj al Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo. Tie komence de oktobro ili ĝuis riĉan fakan programon pri kolektado, konservado kaj utiligo de Esperanto-valorajoj.

La komencan prelegon prezentis Detlev Blanke: „Biblioteko kaj arkivo de familio Blanke“, poste Elzbieta Karczewska parolis pri la Podlaĥia biblioteko en Bjalistoko. Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy prezentis la bibliotekon kaj gazetarkivon de Interkultura Centro Herzberg (ICH).

Post tagmanĝo, Lee Sang-mi prezentis prelegon de Lee Jung-kee pri Kultura Esperanto-Centro Seulo, kun kiu ICH havas multjaran kunlaboron. Nemes Anikó informis pri la ŝtate protektata Fajszki-Kolektaĵo en Budapeŝto, Smail Grbo el Sarajevo prezentis la proprajn bibliotekon, ĝardenon kaj kolekton de esperantaĵoj. Post apudlaga promeno kaj vizito al la urba biblioteko, la tago finiĝis per prelegoj de Toon Witkam: „Alparoli zorgrobotojn esperante“ kaj Johannes Mueller: „Prezentado de Radio Muzaiko“ kaj diskutrotondo.



La dimanĉan programon malfermis Stefan MacGill, kiu skizis la aktualan staton de la projekto „Esperanto 125“, precipe evoluojn en la kreata kursmaterialo flanke de ILEI. Sekvis François Lo Jacomo pri la 60-jara Greziljono: „Novaj projektoj de malnova kultura centro“. Mélanie Maradan prelegis pri la terminologia normigado en la kadro de ISO, kie ŝi estas komisiito de UEA. Tagmeze la kolektivo grimpis al la kastelo por akcepto en la Kavalira Salono kaj posta vizito al la formata Esperanto-ekspozicio. La laborprogramo venis al fino per diskuto pri kunlaboro kaj partnereco ene de la fondata programo PUNTO.

Paralele kun la faka programo, Sabine Trenner gvidis intensan du-tagan Cseh-kurson, kiu altiris dekkvinon da lernantoj el la urbo.

Celo de la aranĝo, organizita kun financa subteno de la Fondaĵo ESF, estis arigi informojn pri Esperanto-bibliotekoj kaj muzeoj por fortigi la kunlaboron, kio inkluzivas la kreon de komunaj datumbankoj. Alia celo estis, pli forte kunlaborigi Esperanto-centrojn, i.a. en la starigo de transaciaj lernejoj aŭ alispecaj projektoj kun oficiala subteno.

Stefan MacGill / Zsófia Kóródy

SANO-2

**28.12.2011-2.1.2012
in Herzberg**

Das 2. SANO über den Jahreswechsel 2011/12 findet nicht in Sieber, sondern in Herzberg statt, da das Hotel Am Pass noch nicht zur Verfügung steht. Man kommt statt dessen in Pensionen oder Hotels in Herzberg unter.

Die Veranstalter bitten um Vorschläge für das Programm. Geplant sind Wanderungen, Ausflüge, Kurse usw. sowie die Silvesternacht im China-Restaurant.

Anmeldungen und nähere Auskünfte:
esperanto-zentrum@web.de
Peter Zilvar / Zsófia Kóródy (Adresse siehe S. 2)

Tri Esperantaj jubileoj en la diocezo Speyer

La 23an de oktobro 2011 la Laborunuigo de la Internacia Katolika Unuigo Esperantista (IKUE) en la diocezo Speyer festis per diservo en la Afra-kapelo de la katedralo en Speyer kaj solenaĵo en la najbara Friedrich-Spee-domo samtempe tri jubileojn. Unue: Antaŭ dudek jaroj la sacerdoto Albrecht Kronenberger invitis al la unua Esperant-lingva diservo en la Afra-kapelon. De tiam ĝis hodiaŭ jare po kvin tiaj mesoj estis celebrataj.

Due: Iom pli poste fondiĝis la laborunuigo kun la celo, realigi komunan religian vivon baze de du kulturoj, nome de la Kristaneco kaj de la Esperantaneco. Ĝis hodiaŭ aliĝis 365 personoj - ĉu aktive, ĉu subtene - al tiu ĉi asocio agnoskita de la diocezo.

La tria festinda dato estis la apero de la ekumena kanto- kaj preĝo-libro *ADORU* antaŭ dek jaroj, al kies ekzisto pastro Kronenberger konsiderinde kontribuis. Rita Rössler-Buckel, la aktuala prezidantino de la asocio, dankis dum la festkunveno al siaj antaŭuloj Manfred Ritthaler, Helmut Rössler (neparenca) kaj Anton Kiefer (kiu malavare ankaŭ tiukaze regalis la ĉeestantojn per sia altkvalita Esperantovino). Mallonge ŝi memorigis la agadon de la asocio: Apud la regulaj mesoj en la katedralo



de Speyer ŝi menciis interalie la paskonoktajn mesojn en la pilgrima kapelo de Maria Rosenberg („rozomonto“), la informostandojn dum la diocezaĵ Katolikaj Tagoj, la MES-aranĝojn en la apudmozela Marienburg, la diservojn en aliaj Esperanto-kunvenoj kaj, tute aktuale, la Interretan portalon Kristanaj Fontoj.

Al la diservo kaj la solenaĵo muzike kontribuis flutogrupo de la regiona popola altlernejo kaj la ensemblo Spira Spiralo. La laborunuigo ankaŭ estonte volas kontribui, ke homoj en komuna lingvo, en la lingvo de d-ro Zamenhof, renkontiĝu, kompreniĝu kaj preĝu trans limojn landajn, kulturajn kaj religiajn.

Franz-Georg Rössler

Bibliaj Tagoj 2012-03-07/11 en Trento/Italujo

Mi invitas vin al novaj Bibliaj Tagoj (kun ADORU) okazontaj de la 7a ĝis la 11a de Marto 2012 en la nord-itala urbeto Trento (germane: Trient).

Kion ni faros?

- Kiel kutime dum Bibliaj Tagoj, ni, t.e. kristanaj (aŭ ne-kristanaj) Esperanto-parolantoj, okupiĝos pri tekstoj el la biblio.
- Per komunaj preĝo- kaj kanto-tempoj kaj per amika kunestado ni praktikos kaj vivos la mesaĝon de la biblio.
- Kun esperantista malfermeco ni komune festos,

celebros, diskutos.

- Ni vizitos la tre interesan lokan Ekumenan Centron kaj interesajn reprezentantojn de diversaj kredoj.
- Ni admiros la belegan panoramon de Garda-Lago kaj tie apude ni eniros evangelian preĝejon festante kun ties pastro evangelian Diservon.
- En alia tago ni ekskursos al bela rus-ortodoksaĵ preĝejo kaj komunumo, kie ni same renkontos la pastron kaj havos mallongan Diservon ortodoksan.

**Stefan Lepping, Mellinstr. 5,
59457 Werl
stefanlepping@gmx.de**

La postmilita sidejo de Germana Esperanto-Asocio en Pasing

Centjara jubileo – memorigo pri d-ro Siegfried Ziegler

En la bulteno de la asocio „Pasinger Archiv“ aperis longa artikolo pri la Esperanto-vivo tie antaŭ 100 jaroj. La 8an de novembro 1911 post (tre malbone vizitata!) fondokunveno ekiĝis Esperanto-grupo en la tiam memstara urbo. Decembre de 1945 iu d-ro Siegfried Ziegler ricevis permeson de la Usona militista registaro, fondi la Munkenan Esperanto-grupon „Laboro“. Kiu estis d-ro Ziegler?

D-ro Siegfried Ziegler naskiĝis en 1902 en Essen, studis geografion kaj botanikon kaj doktoriĝis pri filozofio. Li laboris kiel sport-instruisto, post la milito kiel ĵurnalistoj kaj verkisto. Li eklernis Esperanton jam en 1924 kaj aniĝis al la laborista Esperanto-movado. Aprile de 1947 li kun-iniciatis la refondon de Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj estis ĝia prezidanto ĝis 1953.

Ziegler luprenis la ter-etaĝon en la „vilao Heilmannseder“ (malkonstruita fine de la 60aj jaroj), en Pasing, Engelbertstraße, kiu iĝis la sidejo de GEA. Tie renkontiĝis la loka grupo „Nova tempo“, okazis kursoj kaj ekveturis busoj al eksterlandaj Esperanto-aranĝoj. Pli grave: Ziegler fondis en 1948 ankaŭ la Germanan Esperanto-Instituton (GEI), kies biblioteko trovis sian lokon en la vilao Heilmannseder. Li estis multfaceta



D-ro Siegfried Ziegler (1902-1984)

talentulo, akiris instrukomisionojn en la Munkena universitato kaj en la Teknika Altlernejo, invitis sukcese la 36an Universalan Kongreson en 1951 al Munkeno, verkis kaj distribuis lernolibron sub la pseŭdonimo „brikisto“, eldonis la GEA-revuon „La Ponto“, ktp.

En 1953 li subite kabeis, kio estis terura bato por GEA. Kio okazis? Kiel ano de la laborista Esperanto-movado li ne povis elteni la re-aligon de GEA al la burĝa Universala Esperanto-Asocio. Sed ankaŭ GEA-internaj kritikoj kontraŭ lia eble kelkfoje tro neformala agado senrevigis lin. Kun li malaperis ankaŭ la GEA-sidejo en Pasing. Pri la sorto de la biblioteko oni povas legi en la broŝuro „100 Jahre Deutsches Esperanto-Institut“ (eldonis GEI, Augsburg 2008, p. 30ff). Se Ziegler kaj liaj kritikantoj kapablus al pli da suverena respondeco favore al la komuna celo, la postmilita historio de GEA eble havis pli gloran evoluon.

Rudolf Fischer

La teksto estas kompilaĵo el bulteno de „Pasinger Archiv“, laŭ notoj de Norbert Gütter; el la citita broŝuro de GEI kaj el artikolo de d-ro Werner Bormann el „Interlinguistische Informationen“ 1998 (Beiheft 4, p. 30-33). Pro la bildoj mi dankas al „Pasinger Archiv e.V.“.



Vilao Heilmannseder en Pasing (1968)

30 jarojn *Esperanto aktuell*, revuo de Germana Esperanto-Asocio

30 jarojn aĝas nun *Esperanto aktuell*, nia membro-revuo, kaj okaze de tiu jubileo valoras ioma retrorigardo. Raportas Rudolf Fischer.

Kiam mi en 1981 unuafoje eniris la estraron de Germana Esperanto-Asocio (GEA), ni ne havis membrelevuon, nur informbultenon *Esperanto en F.R. Germanio*, kiun redaktis la membro-administranto Heinrich Nischwitz. Laŭ insisto de junaj aktivuloj la tiama estraro decidis, lanĉi novan membrelevuon. Bonŝance veterano Richard Reuchlin, iam dum jardekoj redaktisto de Germana Esperanto-Revuo, deklaris sin preta, transpreni la redaktan postenon. Tiel en 1982 aperis la unua numero de *Esperanto aktuell*, nigra-blanka, 24-paĝa, kun formato DIN A5.

Nomo uzurpita

La nomon *Esperanto aktuell* uzurpis GEA de la samnoma revuo de la najbara Aŭstra asocio, kies organo aperis ankoraŭ ĝis 2004. Poste la GEA-a *Esperanto aktuell* iĝis ankaŭ la Aŭstra, tiel ke la nomaj ĝemeloj kunfluis al revuo por ambaŭ asocioj.

La dissendadon faris ekde la komenco Richard Hirsch, unu el la plej fidelaj GEA-aktivuloj de la postmilita historio de GEA. Li plenumis tiun taskon – nuntempe apenaŭ kredeble – seninterrompe kaj absolute fideinde ĝis aŭtuno de 2000.

Esperanto aktuell havis kutime 20 paĝojn. Aperis 6 numeroj jare, sed jam fine de la unua jaro la redaktisto, kiu samtempe preparis la Germanan Esperanto-Kongreson de 1983 en Bad Säckingen, bezonis duoblan numeron 5+6 kun 36 paĝoj por reatingi la aperritmon.

En 1983 nia juna generacio transprenis la gvidadon de GEA. Fine de la jaro Richard Reuchlin transdonis la redaktadon al la germanisto d-ro Dirk Willkommen. Kompostadon kaj presadon faris HAPS (Hamburga Administra kaj Presa Servo), komisiono de Germana Esperanto-Junularo. En 1984 aperis 7 numeroj en regula ritmo, ili havis inter 24 kaj 32 paĝojn, foje kun interna 4-paĝa parto *Esperanto-Nachrichten*, pro ties koloro nomita „la flavaj paĝoj“. Tiuj estis elpreneblaj kaj povis servi kiel varbfolioj, bona ideo!

Progreso el Neumünster

Ekde 1985 *Esperanto aktuell* atingis rimarkeble pli altan teknikan kvaliton. Aperis 8 numeroj jare, kun kolora titolo, presitaj de la firmao Simonsen en Neumünster, loĝloko de la redaktisto. Tiu presejo estis fidinda partnero de GEA ĝis fine de 2005. La 8 numeroj havis

nun 28 paĝojn, ekde 1986 ofte ankoraŭ pli. La redaktadon de la „flavaj paĝoj“ transprenis ekde numero 1986/4 Wolfgang Schwanzer; tamen jam en numero 1987/5 ili aperis la lastan fojon. Ofte meze en iu numero ankaŭ aliĝiloj por Esperanto-arangoj estis alkrampitaj.

Kriza periodo

Ĝuste la jubilea jaro 1987 iĝis kriza por *Esperanto aktuell*. La ĝis tiam fervora redaktisto ne plu havis tempon, tiel ke ĝis septembro aperis nur 3 numeroj. En tiu premo la lingvisto Andreas Ludden el Münster transprenis la redaktadon. Li kapablis, ĝis fine de la jaro eldoni almenaŭ 4 pliajn numerojn, parte kun pli ol 40 paĝoj. Elzbieta Klünder el Steinfurt kontribuis per majstraj desegnaĵoj kaj grafikaĵoj. Dum 1988 ĉio iris glate (8 numeroj, inter 28 kaj 44 paĝoj), sed jam en 1989 la sorto de la redaktado el 1987 ripetigis. Per la kvara numero en septembro adiaŭis la deĵoranta redaktisto, post nur du jaroj.

Per komputilo ATARI

Denove *Esperanto aktuell* devis esti savata. Franz Kruse aĉetis komputilon ATARI, ankoraŭ nur kun malgrandaj diskoj kaj pinglopresilo. Kuraĝa decido estis, ke mi, la vicprezidanto, subtenata de mia edzino Hedwig, transprenis la redaktadon. Bonŝance Elzbieta



